# Verda Voĉo de Doksy

REDAKTORO ANT. SLANINA

INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERRANTO - KOLEGIO

Oběžník pro žactvo a přátele "Letní Koleje Esperanta" v D o k s e c h

Č. III.4. Červen 1949


## Ĝ i s r e v i d o e n D o k s y:

Ankoraŭ kelkaj tagoj forpasos kaj komencos Somera klegio de Esperanto. Antaŭ mi sur la tablo estas kartoteko kun nomoj de tiuj, kiuj venos al Doksy. Kaj kun kortuŝo mi vidas multajn nomojn jam konatajn Esperantujo. Jes, jam kvaran fojon kunvanos geamikoj ĝojante pri denova renkontiĝo, por travivi kelkajn feliĉajn tagojn inter Esperantistoj. En nia rondo ni sentas veran animan ripozon, kiun ni ĉiuj vere bezonas.

Al kurso A /komencantoj/ aliĝis novaj entuziasmuloj por nia ideo. Ni akceptas ilin kun vere esperantista koro. Niaj vicoj plimultiĝas kaj nia respondeco pligrandiĝas. Nia devo estas eduki novajn samideanojn al "nova sento", kiu pli kaj pli venas "en la mondon".

Ĝis la revide, karaj malnovaj kaj novaj geamikoj!

A.Slanina.

\- o -

Karolo Píč:

## T i u t e m p e

La juna aĝo estis nia
mirakle bela periodo,
tiam ni vivis sen klopodo,
kaj ĉio estis idilia.

La strato estis nia mondo,
strangega kaj tre nekutima;
en ĝia mezo varmintima
ni ĝoje vivis sen respondo

je mil komplikaj vivaferoj.
Kaj nia bela ruĝa pilko
kaj Georgin´ en mola silko
estis du solaj vivoveroj.

Ĉar en junaĝaj tiuj horoj
nin ne timigis estonteco;
estis nur freŝa panopeco
kaj reĉiamaj tagaŭroroj.

La tempo tiam ne rapidis
samkiel indiana sage
/ja tiutempe estis ago,
se oni tutsenage sidis/;

kaj la tiamaj briloj sunaj
ne diris al ni, ke post jaroj
blankiĝos niaj knabaj haroj
kaj ke ni iĝos eĉ maljunaj.

